

LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graifdijk (N.H.)
Nederlando.
Ĝironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10

Jarabono:
Nederlando: 0.75 guldeno
Aliaj landoj: 1 guldeno
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj

LA PATRINO NE VENAS HEJMEN.

„Halo, knaboj, morgaŭ mi ankaŭ alportos ateston de la sinjoro”, kriis Sander Vermer, venante el la lernejo, dum li svingis sian buterpanujon tra la aero.

„Jes, kiam vi estas dekjara, vi certe ricevos ĝin”, diris pli malgranda knabo, iom envie rigardante al la pli longa Sander, firme konvinkite, ke oni lin ne taksos dekjara.

La knaboj devis marŝi ankoraŭ longan distancon de la lernejo al la Arbarfarmo, preskaŭ tri kvaronhorojn, kaj dum la tuta marŝado ili vigle parolis pri la plezuro, kiu morgaŭ komenciĝos: la turdokaptado. Iom post iom fariĝis ĉi tie kutimo, ke la pli ol dekjaraj lernejbuboj en la somerfino petis al la posedanto de la arbaroj ĉirkaŭ la vilaĝo permesilon por kapti turdojn. En tiu tempo ili ofte malgrandare flugis, antaŭ ol ili kolektiĝis en grandaj svarmoj, kiuj migris al la sudo. Multaj el la kantistetoj ne ĝisvivis la ekvojaĝon, sed implikiĝis en iu kaptilo, logitaj de la pendigitaj beroj. Ili estis sendataj kun multaj samsortanoj al la ĉasaĵvendisto en la urbo.

Por la knaboj ĝi estis plezura okupo! Matene antaŭ la lernejo ili metis kelkajn ŝnurkaptilojn, tagmeze rapide rigardis aŭ metis ankoraŭ kelkajn kaj post la kvara tuj iris al la arbaro, por vidi, ĉu io kaptiĝis.

Jes, Sander havis sukceson, jam la unuan tagon: kvin kaptilojn li faris kaj tri estis okupitaj! Kiom li fanfaronos al la aliaj! Tri turdoj, tio signifis tri dekjarojn. Se tio daŭros tiel, li ekhavos plenan ŝparujon kaj povos multon aĉeti je la Sankta Nikolao!

Ho, nun li devas ilin preni. Du jam estis senvivaj, la ŝnuro ilin

tuj sufokis, sed la tria ankoraŭ batis per la flugiloj, kiam Sander ĝin tuŝis. Atendu, mi prenos vin! Kaj Sander ekkaptis la time flugantan birdeton, malligis la ŝnuron, tiel ankaŭ la grandaj knaboj faris, en unu momento tordi al ĝi la kolon, tiam ĝi ne plu vivus! Sander sentis la varman, pro timo tremantan korpeton en sia mano Nu do, li do ne estas senkuraĝa, kial li ne farus? Dekcendon oni ja ricevas en la urbo por unu turdo, tio estas facile gajnita.

Nu Sander, ne estu timema, vi knabo, kiu ĉion kuraĝas! Sed ĝuste, kiam Sander la manon etendis por ĉesigi sian hezitudon, io tre mirinda okazis al li. Ne plu li aŭdis la timeman kriadon kaj pepadon de la birdo, sed klare li aŭdis, ke la besteto diras: „Ho helpu min, mi devas hejmeniri, al miaj infanoj. Jam tiom longe mi estas ĉi tie implikita, mi volis kunporti kelkajn berojn, sed nun mi ne plu povas min liberigi. Ho, helpu min! Mi devas hejmeniri, mi devas lernigi al ili ankoraŭ multajn aferojn, antaŭ ol ili povos partopreni la grandan vojaĝon, ili ne povas vivi sen mi!”

Ankoraŭ Sander staris tie, la malespera besteto en la maldekstra mano, sed la dekstran, per kiu li intencis mortigi la beston, li jam longe faligis.

„Diru knabo, ĉu vi povas malhavi vian patrinon?” pepis la turdo.

Pro miro Sander eĉ ne unu vorton povis diri, sed aŭtomate li malfermis la manon, kaj jen forflugis la brilanta turdo, rapidante tra la arbustoj por baldaŭ esti tie, kie oni jam longe ĝin vane atendis.

Jen nia Sander staris sola en la arbaro; la du senvivaj birdetoj ankoraŭ pendis en la ŝnurkaptiloj. Ĉu li songis? Kiom stulta li estis! Songi dum la hela tago, imagi, ke birdo povas paroli! Tie! li neniam havos plenan ŝparujon!

Li malligis la senvivajn turdojn kaj enpoŝigis ilin, sed la plezuro estis for. Kiuj vane atendos ĉi tiujn patrinetojn?

II.

„Knabo, Sander, vi venas malfrue”, riproĉis Minjo, la servistino, „estas preskaŭ krepusko antaŭ ol vi hejmen venas. Certe vi pensas: la gepatroj estas for kaj Minjo ne rajtas ordoni al mi! Jen, via mangĉajo, preskaŭ ĝi estas malvarma, la aliaj infanoj hejmenvenis antaŭ pli ol unu horo.”

Silente Sander sidiĝis antaŭ sia telero. Minjo ne volis esti malica, ŝi nur ŝatis grumbleti. Kiam poste la patrino estos ĉe ili, tiam estos hejmece en la ĉambro!

La manĝado rapide finiĝis. Kion nun? Ludi kun la aliaj? Ili amuzis sin per globetoj sur la kuireja planko. Por tio Sander ne havis emon, prefere li legis en la libro, kiun li pruntis el la lerneja biblioteko.

Jam estis mallume, la lampon oni preskaŭ bezonis.

Kiom longe forrestis la gepatroj. La patro ne ŝatis veturi tra la mallumo, ĉiam, kiam ili estis al la foiro, ili pli frue revenis ol nun.

„Minjo, la lampon vi lumigu?”

„Ni atendu ĝis la mastrino kaj la mastro estos hejme, ili verŝajne tuj venos.”

Sander, antaŭ la fenestro, aŭskultis la bruadon de alruliĝantaj radoj, sed ankoraŭ li vane atendis, kiam ekstere jam estis tute mallume.

„Nu infanoj, mi tuj enlitigos vin, ili verŝajne malfruiĝis, ĝemis Minjo, formetante la triklaboron.

„Mi ankoraŭ ne enlitiĝas, mi atendas, ĝis ili estos hejme”, Sander tuj diris.

„Mi same”, diris Klaŭs, kiu sekvis Sander laŭaĝe.

„Nu, ĉi tiun fojon do”, konsentis Minjo, „sed la tri etuloj devas al la lito, estas jam tro malfrue.”

„Ni ne povas dormi sen la patrino”, balbutis la trijara Sinjo, sed post kelkaj minutoj ili tamen kuŝis kaj dormis senzorge kiel en la nesto la birdetoj, kiuj scias, ke la patrino ilin gardas.

Sed Sander kaj Klaŭs staris antaŭ la fenestro, fiksrigardante la malluman alvojon, ĉu ankoraŭ ne vidiĝas ekbrilo de lanterno.

III.

„Certe okazis akcidento!”

Finfine Sander eldiris tion, kio longe fantomis en lia kapo. „Patro kaj patrino certe ne lasus nin en maltrankvilo, se ne estus necese.”

„O Sander, kio okazis?”

Plorante Klaŭs sin alkroĉis al sia frateto.

Subite Sander rememoris, kio okazis tiun posttagmezon en la arbaro: la tremanta birdeto en lia bruna mano kaj la timema kriado: „Helpu min, mi devas hejmeniri.” Ĉu ili mem nun ne estas kiel du junaj birdoj, kiuj atendas sian patrinon? Kiu danĝero minacas ŝin? Ĉu neniam ŝi revenos? Sander sentis la du birdetojn en la pantalonpoŝo.

„Klaŭs, vi restu ĉe Minjo, mi suriras la vojon.”

Klaŭs volis reteni lin, sed Sander forpuŝis lin: li ne povis elteni endome!

La alvojon kun la profundaj radsulkoj li laŭkuris. Sur la gruzovojo ankoraŭ nenio estis videbla!

„Patrino, patro, kie vi estas, ni ne povas sen vi!”

Lumeto malproksime! Sed tio ne estas veturilo: estas du lanternoj sur la veturilo kaj la paŝoj de la ĉevalo estas tiel malproksimen aŭdeblaj en la kvietaj noktoj kaj neniu sono venas al li.

Estas biciklo, aĥ, Sander vane ĝojis!

La viro surbicikla ne rimarkas la malgrandan figuron flanke de la vojo, sed Sander rekonas lin. Li estas la buĉisthelpanto el la urbo.

„Ha, Gerrit, tiel malfrue survoje?”

„Ĉu vi, Sander?”

„Jes, ĉu vi eble vidis miajn gepatrojn? Ili ankoraŭ ne revenis de la foiro!”

„Jes, knabo, mi alportas sciigon por vi; estis preskaŭ fatala tago hodiaŭ.”

„Kio okazis?”

„Jes, apenaŭ ili estas sur la gruzovojo, kiam aŭtomobilo postvenas, la brunĉevalo ektimas pro la signalo, saltas dekstren, ĝuste en la kanalon, la veturilo ĝin sekvis.”

„Kaj patro — patrino?”

„Nu, la farmisto rapide elsaltis, sed la edzino sidis en la veturilo kaj ne estis facile liberigi ŝin. Kaj fine, kiam ŝi estis sur la bordo, ŝi estis preskaŭ senviva. Dum preskaŭ tuta horo la doktoro okupis sin pri ŝi, antaŭ ol ŝi malfermis la okulojn.”

„Kaj ĉu ili ne hejmenvenos?”

„Jes, baldaŭ ili estos ĉi tie, la edzino volis nepre ĉi-vespere hejmen. Sed fakte la doktoro konsilis, ke ŝi tie restu ĉi-nokte.”

Sander subite rememoris la time pepantan turdon, kiun li hodiaŭ havis en la mano, la turdo-patrinon, kiu same volis hejmeniri.

„Ĉu ili certe venos, Gerrit?”

„Jes, certe, sed mi nun devas foriri. Atendu en la domo, knabo, verŝajne daŭros ankoraŭ unu horon.”

Finfine, jen ili venis! La veturilo haltis, ilia propra ĉevalo ĝin tiris, fremda veturigisto sur fremda veturilo, sed la patro trankvilige kapmovis al la infanoj, eĉ antaŭ ol la veturilo haltis.

La patrino devis tuj en la liton, ŝi estis tre konfuza pro la teruro,

sed tamen ŝi dum momento premis la du knabojn al si kaj klinis sin super la lito de la tri pli junaj, estis ja tiom bone, ree esti en la nesto ĉe siaj idoj!

La sekvantan matenon Sander frue ellitiĝis. Rapide rigardi! Jes, la patrino dormis kviete, li ne plu bezonis timi. Vere ŝi estis hejme!

Sed kion li trovis en la poŝo, surmetante siajn vestojn? Ion, mola kiel lanugo! Sander paliĝis, li tenis la du senvivajn turdojn en la mano! Du patrinetoj hieraŭ ne hejmvenis, pro lia kulpo. Rapide Sander suriris la korton kaj sub granda abio apud barilo li entombigis la bestetojn.

Monon pro ili li ne havas en la ŝparujon!

Neniam Sander ree metos kaptilojn.

El la holanda: VANE.

KIAL LA URSOJ NE HAVAS VOSTON.

Estis dumvintre. La rivereto glaciĝis kaj vulpo, kiu tie ĵus malsata preteriras, deziris kapti fiŝojn por kvietigi sian malsaton. Li faris truon en la glacieron, kuŝigis sin apude kaj kaptis la fiŝojn, kiuj venis al la rando por preni iom da freŝa aero. Kiam li estis ĝissate manĝinta, li daŭrigis sian vojon.

Dumvoje li renkontis urson. „Vulpeto,” diris la urso, „kie kaj kiel vi kaptis tiujn delikatajn fiŝojn?”

„Ho kuzeto,” diris la vulpo, „venu kun mi, mi montros al vi.”

Kaj ambaŭ kamaradoj iris kune al la loko, kie la vulpo kaptis tiom da fiŝoj.

Kiam ili tie alvenis, la vulpo diris: „Jen, kuzeto, jen vi vidas truon, ĉu ne? Metu trankvile vian belegan spiraloŝtonon en ĝin: Ĉiuj fiŝoj pendigos sin sur ĝin.”

„Bone,” diris la urso, kaj li efektive eksidis plenfide, kun la vosto en la glacieron.

Kiam la urso sidis tie sufiĉe longe kaj la vulpo opiniis, ke nun la vosto sufiĉe forte frostiĝis al la glacio, li diris al la urso: „Eltiru nun vian voston, kuzeto: multaj fiŝoj jam pendas sur ĝi.”

Kaj la urso, kies malsato ja estis pligrandiĝinta, volis eltiri sian voston, sed o ve! Ĝi derompiĝis kaj restis sub la glacio. Ĝi estas ankoraŭ tie!

Jen kial la ursoj ne havas voston!

Antverpeno, Belgujo.

Rerakontis JAN v. SCHOOR.

LA KVAR GRILOJ DE LA BAKISTINO.

Iam mia amiko Johano eniris panejon por aĉeti bongustan bulkon. Dum li pagis envenis malriĉe, tamen pure vestita knabeto.

„Sinjorino”, li diris al la bakistino, „mia patrino petas, ĉu vi havas panon por mi?”

La vendistino donis al li grandan panon de kvar funtoj.

„Ĉu vi havas monon?”

La vizaĝo de la knabo malsereniĝis. „Ne sinjorino, sed la patrino diris, ke ŝi morgaŭ venos al vi.”

„Nu bone, kunprenu do la panon!”

„Dankon, Sinjorino.”

Elironte la butikon, mia amiko vidis, ke la knabo kun la granda pano ankoraŭ staris malantaŭ li.

„Kion vi atendas?” demandis la virino. „Ĉu vi ne estas kontenta pri la pano?”

„Ho jes, ĝi aspektas tre delikata.”

„Nu, bubeto, portu ĝin al via patrino, alie ŝi pensos, ke vi dumvoje ludis kaj ŝi koleros!”

Sed la infano ne aŭdis ŝin, ĉar io alia havis lian plenan atenton.

La bakistedzino iris al li kaj karesis liajn malgrasajn vangojn.

„Pri kio vi pensas, karuleto?” ŝi demandis.

„Sinjorino, kiu kantas tie ĉi?”

„Oni tute ne kantas,” respondis la virino.

„Certe,” diris la etulo, „aŭdu: gri, gri, gri, gri, gri!”

La bakistino kaj mia amiko aŭskultis kaj ili aŭdis nur la pepadon de kelkaj forno-griloj, la kutimaj gastoj en bakejo.

„Ĉu birdeto faras tion?” demandis la knabo, „aŭ ĉu la pano pepas dum la bakado ĝuste tiel, kiel pomo, kiun oni rostas?”

„Ho ne, bubo, tion faras la griloj. Ili pepas en la bakejo, ĉar la forno estas varma, kaj tio plaĉas al ili.”

La vizaĝo de la infano heliĝis. „Sinjorino”, li petis, ruĝiĝante pro sia impertinenta peto, „mi tre dezirus havi unu grilon!”

„Grilon?” ridis la bakistino, „kion vi farus kun ĝi?”

„Ah, Sinjorino, nur unu! Donu al mi nur unu!” petegis la infano.

„Oni diras, ke la griloj alportas feliĉon. Eble la patrino ne plu tiom ploras, se ni havus grilon hejme.”

„Kaj kial via patrino ploras?” demandis mia amiko.

„Ĉar ŝi ne povas pagi la kontojn, sinjoro. La patro mortis, kaj kvankam la patrino laboregas, ŝi ne povas pagi ĉion.”

Mia amiko ĉirkaŭbrakis la infanon kaj kisis liajn palajn van-
gojn. Dume la bakisto kaptis en la bakejo kvar grilojn, metis ilin
en skatolon kaj donis tion al la infano, kiu tuj forrapidis.

Poste la bakistino prenis sian kaslibron, malfermis ĝin, kaj skri-
bis sub la kalkulo de la kompatinda vidvino: „Pagita”.

Mia amiko prenis la tutan enhavon el sia monujo, kaj la bakistino
faris ĝin kune kun la kvitanco en koverton. Ŝi portigis ĉion al
la patrino de la afabla bubeto. La infaneto kun la granda pano,
siaj kvar griloj kaj siaj mallongaj kruroj ne iris tiel rapide kiel la
servisto de la bakisto. Kiam la etulo do venis hejmen, lia patrino
rigardis lin kun ĝoja vizaĝo. Ha kiel feliĉa li estis! Li opiniis,
ke la kvar nigraj bestetoj estas la kaŭzo de tiu miraklo, kaj tial li
bone prizorgis la kvar bestetojn. Ili ja alportis feliĉon en ilian do-
mon, ĉu ne?

Amsterdamo, Nederlando.

C. VAN TUSSCHENBROEK.

ATENTU!

KORESPONDADRESOJ: ĉiu vorto: 0,03 gld.

Al niaj abonantoj: Ĉiu abonanto, aŭ grupo, havas la rajton enpresigi sen-
pagan korespondadreson unufoje en la jaro.

Franцуjo: 14 jara knabo deziras korespondi kun geamikoj el ĉiuj landoj
por interŝanĝi PM kaj PK. I. Bonvolu skribi al: R. Delepine, 5, rue Lafayette
Toul. Certa respondo.

Nederlando: N. Benninga, Kolham, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri
diversaj temoj.

Nederlando: S.ro T. Aalderts, Wandelweg 104, Wormerveer, dez. kor. kun
ĉiuj landoj. Precipe Aŭstralio kaj Ameriko. Metio: Barbisto. Interesas sin
ankaŭ por spiritistaj aferoj. Respondo certa.

Nederlando: S.ro A. Evers, Lind 3389, Oisterwyk, deziras korespondi kun
gesamideanoj en ĉiuj landoj. Certe respondos. L. kaj Pk. I.

Hispanujo: E. Marti, str. Pablo Iglesias 23, (Kat.) deziras korespondi kun
gekamaradoj el ĉiuj landoj, en Esp. aŭ Franca lingvo, pri ĉiuj temoj. Filati-
listaj ankaŭ interesas min!

**Al la abonantoj, kiuj ankoraŭ ne pagis la abonmonon por la
nuna jaro, ni afable petas: faru tion baldaŭ. Tiel vi ŝparas al ni
multe da laboro kaj al vi mem la kvitanckoston.**

Post 15 Sept. ni komencos sendi kvitancojn!

MIGRA KANTO.

Mezforte.

J. Gersbach.



Pro-me-nan-te sur la bor-do, De la blu-a, vas-ta



mar', Ni aŭs-kul-tas la plaŭ-da-don Kaj bru-ad-on de l'on-



dar', Mi-gri, mi-gri en so-mer', Es-tas ve-ra ĝoj' sur ter'.


Se ni vagas en la montoj,
Birdkantado ravas nin.
La ŝaŭmantajn akvofalojn
Admiradas ni sen fin'.
Migri, migri en somer'
Estas vera ĝoj' sur ter'.

Sur la vasta erikejo
Refortigas nin la sun'.
Idealojn ni pripensas
Ĉe la lumo de la lun'.
Migri, migri en somer'
Estas vera ĝoj' sur ter'.

Belaj tagoj en naturo,
Ni vin ŝlosas en la kor',
Vi, vi restos en la vivo,
Hela, ora rememor'.
Kara tero, ĉe la fin',
Ni elkore dankos vin.

Teksto de C. J. Roskes-Dirksen.

El: „La Esperanta Kantokolekto”, J. H. Vink, Scheveningen.



SOLVO EL NO. 1.

Kvankam la enigmo ne estis tro malfacila, ni ne ricevis tiom da solvoj, kiom ni kutimas. Eble la somerferio estis la kaŭzo? Ni esperas ke nun ĉiu abonanto faru sian eblon.

La premiojn gajnis ĉi foje: S.ro Schjøtt, Kalundborg, Danujo; S.ro Nyman, Bithoven, Nederlando; S.ro Bodo, p. Willendorf, N. Aŭstrio; M. Filipovic, Kragujevae, Jugoslavio.

ATENTU!

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „La Unuan Jarkolekton” de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.

NOVAJ ENIGMOJ.

Serĉu kvinliterajn vortojn, kiuj signifas:

1. Logon de tio, kio estas ĉarma. 2. Hejman mambeston, kiun oni grasigas. 3. Dekpiedan mar-krustulon. 4. Malmolan, nigran substancon por hejti. 5. Osteton en buŝo. 6. Frukton. 7. Viran veston. 8. Superan parton de la homa korpo.

Interŝanĝu la unuajn kaj kvarajn literojn, kaj vi ricevos aliajn vortojn, kiuj signifas:

1. Ŝliman terspacon. 2. La tutan personon. 3. Homan membron. 4. Ŝipeton. 5. Tolan loĝejon. 6. Nobelan titolon. 7. Insekto - manĝantan mambeston. 8. Hazardon.

Soissons, Francujo.

J. BOURNICHE.

1				2				3
	█	█	█		█	█	█	
	█	█	█		█	█	█	
	█	█	█		█	█	█	
2								
	█	█	█		█	█	█	
	█	█	█		█	█	█	
	█	█	█		█	█	█	
3								

La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:

1. Nederlandan urbon.
2. Nomon de lingvo.
3. Personon, kiu ne diras la veron.

Jugoslavio. M. FILIPOVIC (10 jara).

Inter la sendintoj de la ĝustaj solvoj ni disdonos 4 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis la unua de Novembro.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

En „The Ploughshare” (angla instruista gazeto) aperis: „Iu fakto, ie, dum la mondmilito”. („La Juna Vivo” No. 8). Trad. E. Osmond. En „Národní Osvození” (ĉeĥa gazeto) aperis: „Cigano kaj Litovo” (No. 1 „La Juna Vivo”) kaj „Du Avaruloj” (La Juna Vivo” No. 20—21) Ambaŭ tradukis s. ro Omelka, Hluk.

En „Svenska Esp. Tidningen” aperis du artikoloj el „La Juna Vivo”: „Nova Monumento por Zamenhof (Nr. 24) kaj „La Blinda Knabo” (No. 24).

Daŭrigu tiun laboron, ĝi estas multvalora. Sed ne forgesu mencii la redakcian adreson de „La Juna Vivo”: West-Graafthijk, Nederlando!

Varbu abonantojn!

Por komencantoj.

LA DUDEK KVINA LECIONO.

A. Panjo = kara patrino; Manjo = kara Mario; Sonjo — Sofio; Lunjo-Luizo.

Paĉjo = kara patro; Peĉjo = kara Petro; Joĉjo — Johano; Luĉjo — Ludoviko.

B. Arbo — arbaro; dento — dentaro; ilaro; foliario; vortaro; gazetaro; tendaro; homaro; amikaro; ŝtuparo; kantaro; vagonaro; hararo; **insularo**; montaro; kamparo (kamparano); ŝiparo; adresaro; meblaro; vest-hokaro; bestaro; **leĝaro**; stelaro; junularo; infanaro; ŝafaro; **brutaro**.

C. **Estro**; **regn-estro**; **urbestro**; **policestro**; **lernejestro**; **ŝipestro**.

D.

LA SCIENCISTO.

La **filozofo** Newton tre **intense** pripensis malfacilan **problemon** kaj pro tio li forgesis iri por matenmanĝi. Lia **bonkora (brava)** edzino timis, ke tio domaĝos lian sanon kaj ŝi sendis serviston kun ovo kaj akvujo al la studoĉambro de la sciencisto.

La servisto devis kuiri la ovon por sinjoro Newton. Sed la filozofo deziris esti sola kaj forsendis la serviston. Li diris, ke li mem kuiros la ovon. La servisto **obeis**, sed li ankoraŭ atentigis la mastron, ke la ovo devas dum tri minutoj kuŝi en la **bolanta** akvo. Por tio li kuŝigis horloĝon ĉe la akvujo kaj poste foriris. Ĉar li timis, ke Newton denove forgesos manĝi, li post kelka tempo ree eniris kaj nun **vole ne vole** devis ridegi: Ĉe la forno staris Newton. Li ege pripensis ion. En la dekstra mano li tenis ovon. La akvo bolis en la ujo kaj en ĝi kuŝis la horloĝo.

E.

FABELO PRI LA ŜAKLUDO.

La **potenca suvereno** de Turkujo **enuis**, kaj neniu povis **distri** la **regn-estron** (monarĥon). La servistaro timis la koleron de la estro kaj ĉiuj ĝojis, kiam alvenis fremdulo, kiu promesis amuzi la potenculon. Kaj la fremdulo vizitis la **sultanon** kaj instruis al li la novan ludon, la ŝakludon. Al la sultano tre plaĉis ĉi tiu ludo. Baldaŭ li kapablis la regulojn kaj kun granda intereso li ludis foje kaj refoje kun la fremdulo. Tutkore li fine diris al ĉi tiu: „Vi amuzis

kaj distris min. Petu **rekompencan**, tiom granda kaj alta kiom vi deziras.”

La fremdulo respondis: „Mi nur deziras malgrandan donacon, sed mi timas, ke vi ne donos ĝin al mi. Kuŝigu sur la unua **kvadrato** de la ŝak-tabulo unu **rizeron**, sur la dua du, sur la tria kvar, sur la kvara ok, sur la kvina dek ses k.t.p. ĉiam la duoblon.”

La sultano ridegis: „Vi estas tro **modesta!** Sed mi **agos** laŭ via deziro.” Kaj la potenculo alvokis la servistaron kaj **ordonis**. —

Post malmulta tempo venis la saĝuloj kaj klarigis al la suvereno, ke ili ne povos havigi al li tiom da rizo. Kaj ili kalkulis, ke dum sepdek jaroj sur la tuta tero devus kreski rizo, se li dezirus posedi tiom.

La sultano miris pri la inteligenta fremdulo kaj ĉar li ne povis doni la donacon, li riĉigis la fremdulon per multaj valorajoj.

Sed vi ne kredas tion? Prenu krajonon kaj mem rekalkulu!

Schattendorf, Aŭstrio.

J. WIESBÖCK.

- I. Lernu bone la novajn vortojn en A, B, C, D, E.
- II. Traduku A, B, C, D, E, en vian gepatran lingvon.
- III. Rakontu la historion pri „La sciencisto” en via grupo.
- IV. Legu kelkfoje la „Fabelo pri la ŝakludo” kaj respondu al jenaj demandoj:

Pri kiu ludo **traktas** la fabelo? Kion faris la suvereno de Turkujo? Kiu alvenis? Kion la fremdulo promesis? Kion li faris? Ĉu plaĉis la ludo al la sultano? Kun kiu li ofte ludis la ŝakludon? Kion li fine diris al la fremdulo? Kion petis la fremdulo? Kion faris la sultano? Al kiu li ordonis plenumi la peton? Kiu poste alvenis?

Kion ili diris? Kion faris la sultano poste? Kion ricevis la fremdulo?

LA DUDEK SESA LECIONO.

Sep katidoj.

„Ho patrino”, kriis Manjo, kiu staris supre ĉe la ŝtuparo, „venu do por vidi!”

La patrino estis en la kuirejo kaj ne havis tempon.

„Venu al mi!” ŝi kriis, „kaj rapidu al la lernejo. Vi certe venos tro malfrue!”

„Ho, patrino, venu do momenton! Estas tiel ĉarme!”

„Kio, estas tiel ĉarma?” demandis la patrino, kiu vole ne vole iris supren.

„Rigardu en la anguleto. Ĉu vi ilin vidas, en la korbeto?”

Nun la patrino vidis ilin: kvar katidojn.

„Ĉu ili ne estas ĉarmaj? Ĉu mi rajtas teni ilin?”

„Ho infano, kion vi faros kun kvar katidoj?”

„Nu, unu por Petro, unu por la fratineto kaj du por mi, ĉar mi estas la plej aĝa!”

„Sed Manjo, tiel nia domo fariĝos katejo!”

„Kion vi do faros kun ili?” demandis Manjo kun timaj okuloj.



„Provizore ni lasos ilin ĉe la patrino. Tio daŭros **almenaŭ** ses semajnojn. Kaj nun iru al la lernejo. Estas jam dek minutoj antaŭ la naŭa (horo)!”

Ses semajnoj estas longa tempo, do Manjo gaja iris al la lernejo. Sur la vojo (survoje) ŝi rakontis al Petro pri la katidoj. Li tre bedaŭris, ke li ne vidis ilin.

Tuj kiam la infanoj estis hejme el la lernejo, ili iris supren. La malgranda fratineto vokis ilin, sed ili ne aŭdis, ili iris al la katidoj! Tial ili ne havis tempon por aŭskulti la fratineton.

Sed ankaŭ ĉi tiu povis iri supren! Per manoj kaj piedoj ŝi suriris la ŝtuparon kaj rapidis al la kat-angulo.

El „Blond en Bruin” J. B. Wolters, Groningen, den Haag, Batavia.

„Atentu”, diris Manjo, „ne venu tro proksime, la kato gratos vin!”

„La kato neniam gratas min!”

„Jes, sed nun ĝi havas idojn, kaj ĝi timas, ke vi faros doloron al ili.”

„Ne timu, kateto, mi ne faros doloron al viaj infanetoj!” diris la infaneto kaj ŝi karesis la kapon de la besto.

Manjo vere timis, ke la kato gratos la infanon, sed ĉi tiu ne faris. Ĝi nur klinis la kapon sub la maneto.

Jen unu el la idoj aperis tempeton el sub la patrino. Ho, kia etulo!

„Mi ne vidas ĝiajn okulojn!” diris Petro. „Ĉu vi vidas, ĝi fermas la okulojn!”

„Junaj katidoj ĉiam faras tion. Komence ili estas blindaj.”

„Kaj kiam ili ekvidas?”

„Mi kredas post naŭ tagoj.”

„Kiom da katoj estas?” eksonis la voĉo de la patrino.

„Kvar”, diris Manjo.

„Kaj mi nombras sep!”

„Ne, certe ne, vidu nur!”

„Nu, diris la patrino, „venu! Kvar katetoj restas tie ĉi, kaj la tri aliaj iras kun mi, por manĝi.”

- a. Lernu bone la novajn vortojn.
- b. Traduku la rakonton en vian gepatran lingvon.
- c. Legu kelkfoje la lecionon kaj respondu al jenaj demandoj:

Kie estis Manjo? Kie estis la patrino? Ĉu la patrino aŭdis la voĉon de Manjo? Ĉu ŝi tuj iris al Manjo? Kion ŝi diris? Kio estis tiel ĉarma? Kiom da katidoj estis en la korbeto? Kion Manjo petis? Ĉu la patrino konsentis? Kion ŝi diris? Al kiu Manjo rakontis pri la katidoj? Kien iris la infanoj el la lernejo? Kiu vokis ilin? Ĉu ankaŭ la fratineto povis iri al la katidoj? Kion ŝi faris?

Kion timis Manjo? Ĉu tio okazis? Kio okazis? Ĉu la katido povis vidi? Kion demandis la patrino? Kiom da katoj ŝi nombris? Kiom da katoj iris kun ŝi por manĝi?

Unu el la plej egaj malfeliĉoj en la vivo estas la lingvodiverseco.

VOLTAIRE (1694—1778).

KION DIRAS LA LEGANTOJ.

..... Mi gratulas vin pro la sukceso kaj ĝenerala boneco de „La Juna Vivo”, kaj ĝis nun rekomendis ĝin laŭ mia eblo.

Londono, Anglujo. (red. „The British Esperantist”) M. C. BUTLER.

..... KREDU, ke mi povas ĝuste taksu, kiom da energielspezo reprezentas via laŭdinda laboro.

Parizo, Francujo.

E. LANTI.

..... La lecionoj estas tre utilaj por lernantoj kaj la rakontoj helpas progresantojn al pli granda vortkono. La stilo kaj ideoj ankaŭ estas tre laŭdindaj. Mi esperas, ke ĝi multe disvastiĝu en la nova jaro!

Londono, Anglujo.

E. L. OSMOND.

..... „La Juna Vivo” al mi tre plaĉas, precipe la kurso, ĉar mi mem gvidas skribajn esperantajn kursojn. Bonvolu ankaŭ al mi sendi la gazeton, komence de la numero, en kiu vi komencis publikigi la esperantan kurson. Se vi konsentas, mi deziras ankaŭ kunlabori.

Jesenice, Jugoslavio.

P. GOLOBIČ.

..... Mi havas la plej grandan intereson pri via entrepreno kaj deziras al ĝi plenan sukceson. Mi pensas, ke ĝi speciale pro sia facilegebla enhavo havas grandan mision inter la infanaro kaj duonmaturuloj, eĉ inter plenkreskaj komencantoj.

Odense, Danlando.

H. P. NIELSEN.

..... Mi ĝojas, ĉar la gazeto ĉiam pli kaj pli disvastiĝas en Danlando. Ĝi meritas ankoraŭ multajn novajn legantojn.

Erslev, Danlando.

M. JENSEN.

..... De la komenco de mia esp-istiĝi mi ĉiam sentas, ke mankas legaĵo por komencantoj — precipe por la junularo. Kaj kiam mi aŭdis pri „La Juna Vivo” mi volonte pagis la abonmonon, kvankam mi jam ne estis komencanto.

„La Juna Vivo” estas tre taŭga por la junularo kaj multe instruas ankaŭ por ni, gvidantoj — estas mia opinio.

Sinjorino, mi restos ĉiam fidela al la de vi redaktata gazeto!

Efektive gazeteldonado estas nuntempe pli ol malfacila. En mia lando la esp-eldonantoj ankaŭ asketas, kaj ĉiu suferas pro peza deficiito.

Mi estas 25-jara floristo, ne tro riĉa. Do por mi estas neeble, multe helpi vin finance — tion mi tre bedaŭras. En la venonta printempo mi konstruos florvarmejon kaj kulturos pli grandskale — tiam mi estos pli libera je monafero.

Vi petis, ke mi traduku ion el la japana lingvo. Mi volonte akceptas. Post kelkaj semajnoj mi sendos manuskriptojn kaj daŭre verkos.

Mi finas mian leteron, sed bonvolu kredi min, mi ĉiam plenumas, kion mi promesis.

Bonvole persistu ankoraŭ iom da tempo, oni nepre glorsalutos vin!

Tokio, Japanujo.

SHUJI NANYA.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

Kongreslibro de Ripoll. 130 paĝa libro, eldonita de „Kataluna Esperantista Federacio” okaze de la XVIIa Kataluna Esperanto-Kongreso. Presita sur bona papero kun belaj fotografaĵoj. Prezo: 0,40 gld.

„La Rondo”. Esperantista danco, elpensita de S.ro Tudó i Duran, laŭ pireneaj popolaj arioj kaj dancoj, kaj enharmoniigita de profesoro Botey. Desegnaĵoj de S.ro Ismael Smith. Reeldonita de Iberia Esperanto-Servo. Prezo: 0,20 gld.

„Esperanta Kantokolekto”. Ĉi tiu belaspekta, 32 paĝa libreto povas manki al neniu bona esperantisto! Ĝi enhavas 19 kantojn kun muziko, kaj kelkajn belajn desegnaĵojn. Tre taŭga por grupkunvenoj. Eld. J. H. Vink. Prezo. 0,25 gld.

„La Holanda Muelilo”. Serio da ses bildkartoj en koverto, montrantaj la muelilon en la holanda pejzaĝo. Eldonas J. H. Vink. Prezo: 0,25 gld.

„Kan-U-Go”. Nova esperanta kartludo (60 kartetoj en luksa skatolo), por formi krucvortojn. Ludebla de unu ĝis sep personoj. Instrua kaj amuza! Eld. Brita Esperanto Asocio. Prezo: 0,94 gld.

Organo de jugoslava esp. movado

„LA SUDA STELO”

aperas ĉiumonate en Sl. Brod.

Jarabono: 1½ us. dol. aŭ 5 svfr.

Specimenon kontraŭ poŝta respondkuponon tuj sendas Redakcio de „La suda stelo” Slav. Brod, (Jugoslavio).

ATENTU!!!

La plej taŭga kaj malkara lernilo por esp. kursoj estas:

„La Unua Jarkolekto de La Juna Vivo”.

La preskaŭ 200 paĝa libro, en bela kovrilo, kostas nur 0,75 gld. Grupoj ricevas rabaton!

„LITERATURA MONDO” (Budapest) eldonas:

	Ordinara prezo	prezo AELA-anoj
Dancu Marionetoj, J. Baghy	f 1,35	f 1,12½
Viktimoj, „	f 2,75	f 1,65
Preter la Vivo, „	f 1,10	f 0,65
Lingvo, Stilo, Formo, Kalocsay	f 0,82½	f 0,50
Streĉita Kordo „	f 2,20	f 1,32½

Aliĝu al AELA; tiel vi povas aĉeti malkarajn librojn, kaj samtempe vi subtenas la esp. movadon. Anoncu vin ĉe la redakcio.

Mendu viajn librojn ĉe la radakcio de „La Juna Vivo”!

ANTAŬEN!

Monata gazeto eldonata de la Esp.
Grupo en Dunkerque-Malo,
unu el la plej viglaj en Francujo.

Amuze ilustrata. „**Ion por la gusto de ĉiu**”. Ĉefredaktoro: **Claude VERNAY**, Avenue du Méridien, Malo-les-Bains, (Nord) Jarabono: 6 franc. frank. aŭ 4 resp. kuponoj.

Jarkotizo

Aŭstrio	3.20 ŝil.
Britujo	3 ŝil.
Belgujo	17 fr.
Ĉeĥoslovakujo	16½ Ĉ. kr.
Danujo	3 kr.
Germanujo	1.75 M.
Hispanujo	5 pes.
Norvegujo	2.7 kr.
Polujo	3.6 zl.
Svedujo	2.70 kr.



„FLORETOJ”
Porinfanaj Rakontoj
tradukitaj de la
„VENDREDA KLUBO”
en Winschoten
(Nederlando)

Kun multaj koloraj kaj nigraj
bildoj
de C. Jetses
prezo 0.70 ned. guld.

Aĉetebla en ĉiu librejo kaj ĉe la
eldonisto:

J. B. WOLTERS

**Groningen — Den Haag
Batavia.**

Bonvolu sendi la monon por „La Juna Vivo”:

Ameriko: Amerika Esperanto-Instituto, Madison. Wis., Usono.

Anglujo: The British Esp. Association, Inc. 142 High Holborn, London, W.C.I.

Aŭstrio: S-ro Scheibenreiter, Hermangasse 31/26, Wien VII.

Belgujo: Hendrik Rainson, Mechelen, Belga ĝironumero 335183.

Ĉeĥoslovakujo: L. J. Svoboda, Plzen, „U Zvonu” ĝironumero 14171 Praha.

Danujo: S.rino M. Jensen, Galtrup. Erslev. ĝironumero 44593.

Francujo: S-ro Matthieu, Dijon, 27 Place de la République, Côte d’Or.
ĝironumero: Cheque postal No. 12025. Dijon. (Côte d’Or).

Germanujo: Ewald Killmer, Schwabenweg 14, Wuppertal-Elberfeld. Germana
ĝironumero: „Köln 104097”.

Hispanujo: S-ro Montserrat, str. Provenza, 75, 2°, 3°, Barcelona.

Jugoslavio: Vilim Buk, Knjigotiskara, Sl. Brod. Ĉeko N.ro 37.556.

Svedujo: John Karlsson, Hylinge Norrköping. Sveda ĝironumero: 72295.

Japanujo: Ishiguro, Daita 1—784, Setagaya, Tokio.

Ĉinujo: S-ro Ĉan, 15 Shang Sieh Chia, Peiping.

Oni povas pagi per eksterlanda poŝtmandato, **7 poŝtrespondkuponoj**, *) ĝirokonto, aŭ papermono en letero. Informiĝu en la poŝtoŝicejo, kio estas la plej malkara.

*) Abonantoj, kiuj ne rajtas sendi monon eksterlanden, povas pagi per 7 respondkuponoj.

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”!